4-a Jaro. N-o 195 APERAS SEMAJNE 28. Junio 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

## En Sovetio plimultiĝas la pastroj, sed ne la religianoj

En n-o 190 de "S-ulo" estis citita laŭ franclingva ĵurnalo "fakto" pri plinombriĝo de l' pastraro en Ukrainio, kiu ŝajnas timiga por liberpensuloj kaj tutmonda Laboristaro amika al Sovetio. Tamen ni bone scias, ke burĝaj ĵurnaloj ĉiam sciigas al siaj legantoj speciale elektitajn "faktojn" el sovetiaj ĵurnaloj, ne menciante komenton de tiuj lastaj.

Tiu okazo estas bona ekzemplo, por montri al nia sennaciularo la ruzajn metodojn de l' burĝa naciularo.

Efektive, la nombro de l' eklezia pastraro ne nur en Ukrainio nur ĉefe tie), sed en tuta Sovetio iom kreskis. Kio kaŭzis tiun fenomenon? Ĉu plimultiĝo de religianoj? Ĉu organizo de novaj temploj aŭ paroĥoj? Tute ne.

La Oktobra Revolucio klare evidentigis la kontraŭrevolucian, ekspluatistan esencon de l' eklezio, havinta dum cara reĝimo multegajn kaj riĉegajn bienojn, malavare subvenciata de la cara registaro kaj dum Revolucio batalinta armite kontraŭ Ruĝa armeo. La konservativeco de l' eklezio serioze estis ŝancelata ankaŭ per publika esploro de diversaj "sanktaj restaĵoj" (relikvoj), en kiuj ĉie estis trovataj diversaj objektoj tute ne sanktaj kaj falsantaj homajn restaĵojn. Oni konstatis ostojn de hundoj, vaton, virinajn ŝtrumpojn, buligitan materion ktp. Konstanta senmaskigo de diversaj agmanieroj religiaj kaj ekleziaj, insiste aranĝita en komenca periodo de l' Revolucio flanke de la registaro, multe helpis al senreligiiĝo de l' laboristaj kaj kamparanaj amasoj.

La Nova ekonomia politiko (1921) fine elvokis krizon en la eklezio. Eĉ la restaĵoj de la burĝaro, ricevinte rajton negoci, iom paciĝis kun la soveta reĝimo. Pli kaj pli kunfandiĝantaj ĉirkaŭ la sovetoj, la laborulaj amasoj pli altgrade malkonfidis la reakciemon kaj konservativecon de la eklezio, kiu staris jam antaŭ la perdo de l' tuta influo al kredulaj amasoj, perdo de siaj jam tiutempe malgrandaj profitoj. Rezulto de tiuj ekonomiaj kaj politikaj faktoroj estis ribelo en la eklezio mem, eksplodo de plej "demokrataj" pastroj kontraŭ la patriarko Tiĥon, atako kontraŭ la ĉefpreĝejo en Moskvo je nomo de Jesuo Kristo. Organiziĝis demokratiigita, "novigita eklezio", gvidata nun de ĉefepiskopo Vvedenskij. La disfalo ne ĉesis. Sekvis organiziĝoj de novaj eklezioj, ekzemple "Renaskiĝo" (plej radikala de eklezia vidpunkto), diversaj memregaj eklezioj en naciaj respublikoj, enkalkulante Ukrainion, kie la disfalo okazis en multajn novajn ekleziajn formiĝojn.

Okazis granda batalo intereklezia kaj eneklezia, kiu fakte estis batalo pri tio, kiu posedos la kredulajn amasojn. Kaj ĉiuj reformoj estis farataj nur pro tio, ke la eklezio neniam estis porlaborula. Oni trovis necese montri kvazaŭ resonadon de l' "demokratia" epoko, adaptiĝi al la novaj cirkonstancoj. Sed kiel tion fari, kiujn reformojn aranĝi — tio estas disputebla kaj bataliga problemo, kiu kaŭzis la disfalon de l' eklezio en multajn sektojn.

Rezulte en samaj loĝlokoj aperis paralelaj novaj episkopoj de nove organizitaj eklezioj, novaj paralelaj pastroj, kiuj batalis pro unu sola preĝejo, aŭ se estis kelkaj preĝejoj, batalis pro tio, kiu kiun posedos. Tiel anstataŭ unu episkopo en sama loko ekestis du aŭ eĉ tri. Krom tio la ekleziuloj, por pliviglígi la religian propagandon kaj por pli ebligi spertan religian gvidadon, instalis novajn episkopojn ne nur en guberniaj urboj (laŭ antaŭmilita maniero), sed preskaŭ en ĉiuj distriktaj urboj. Tamen la kredula amaso ne nur restis la sama nombro, sed ankoraŭ pli malmultiĝis. Jam antaŭ la imperialista milito diakonoj restis nur en plej grandaj paroĥoj aŭ ĉefpreĝejoj, sed nun laŭ decidoj de ekleziaj kongresoj preskaŭ ĉiu preĝejo havas diakonon por plisolenigi la diservon, por allogi la amason.

Tio estas la kaŭzo, kial kreskis la nombro de eklezia pastraro, kies vicoj estas plenigataj de senlabora burĝaro, de estintaj "grandsinjoroj", kiuj volas manĝi, kaj "la patro ĉiela nutras kaj varmigas ilin", ĉar la eklezio ĝis nun restis en Sovetio la lasta citadelo de l' reakcia propagando kaj batalo, kontraŭ kiu ni cetere nun organizis seriozan atakadon.

Sendube, la religiuloj jam adaptiĝis al la sovetiaj cirkonstancoj kaj ordigis siajn vicojn malordigitajn de la Revolucio. Ili sukcesis per novaj metodoj kolekti ĉirkaŭ si la restintajn kredulajn rondojn; sed novajn kredulojn ili ne akiris. Kunordigitaj falangoj de kreduloj eĉ arogante klopodas ricevi de la sovetia registaro la permeson organizi religiajn lernejojn; certe, sensukcese.

La senreligieco rapide kreskas. Kiam ni diras, ke la Sovetia Ateista Unio nun havas 250 000 membrojn, eble germaniaj K-doj miros: Kiom malmulte! Sed tio nur estas la nombro de organ-

izitaj ateistoj (ruse oni diras "sendiuloj"), kaj la aĝo de l' Unio nur estas 3—4 jaroj. Aldonu al tiu nombro ankoraŭ 2,5 milionojn da komunistoj kaj junkomunistoj, aldonu la junpionirojn, kiuj ankaŭ jam estas sendiuloj, kalkulu multajn senpartianojn senreligiajn, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne aliĝis al la Ateista Unio (ekz. en nia oficejo, kie mi oficas, preskaŭ 75% de la senpartianoj estas senreligiaj): — vi povas sekve kalkuli en Sovetio almenaŭ 10—15 milionojn da ateistoj. Precipe preskaŭ la tuta junularo estas senreligia. Ni devas diri, ke lastaj 50 000 aliĝis al la Ateista Unio nur dum la 6 lastaj monatoj. Ekzemple nia Zamoskoreĉja regiono en Moskvo havis dum pasinta aŭtuno kontraŭ 2 preĝejoj nur unu ateistan ĉelon. Sed nun ni havas 2,5 ĉelojn kontraŭ unu preĝejo, kaj la nombro de membroj senhezite rapide kreskas.

La konkludo estas, ke ne kreskas la religiemo en la amasoj, kvankam kreskis la nombro de episkopoj aŭ popoj. Senreligieco kreskas. Ordiginte kaj plifortiginte siajn vicojn, la pastroj kaj sektanoj atakas la amasojn, arogantas, ruzas ĉiamaniere, iatempe sukcese. Ni bone konsideras la eblan danĝeron por nia socialisma konstruado, malhelpon ĝian kaŭzatan de la religio, kaj nun ni larĝe kaj sukcese plifortigas nian kontraŭreligian propagandon. N. Incertov (259).

# LETERO EL LONDONO

Antaŭ 300 jaroj William Harvey (Ŭilli-am Harvi) elkovris la sisteman cirkuladon de la sango. Kiel la postaj elpensoj de la franco Pasteur pri mikroboj, la skoto Simpson pri kloroformo kaj la germano Koch pri tuberkulozo la grava antaŭenpaŝo de Harvey helpis sciencistojn laŭ tutmonda skalo. Nur en militpreparado kaj ekonomia konkurado necesas la sekreteco. Sovetiaj, germanaj, francaj kaj britaj kuracistoj ĵus solenas kune la daton, kiam en 1628 Harvey pruvis, ke la koro estas pumpilo, kiu igas la sangon flui kaj reflui tra la tuta korpo. Kompreneble la tiamuloj mokis lin kiel malsaĝulon.

* * *

Severa krizo regas en la brita tekskatun-industrio. Eksporto de la katunvaroj falis je 33% kompare kun jaro 1912. Pro bojkoto kaj enlanda industrio la hindoj aĉetis nur trionon el la antaŭa kvanto. Eĉ en Britio la kvanto vendita po loĝanto malaltiĝis de 29.80 metroj en jaro 1912 ĝis 19 metroj en 1924. Kion fari? Kiel kutime la mastroj atakas la salajrojn kaj volas plilongigi la labortagon. Sed, laŭ analizo, el prezo de ĉiu funto da ŝpinita fadeno la kapitalistoj nun ricevas 2 pencojn anstataŭ duonon da penco en 1924. Pro inflacio de kapitalo anstataŭ 14 ŝilingoj ĉiu spindelo[1]) nun reprezentas 43¾ ŝil. Jen la kaŭzo — parte — de la malsano. Britio floris pro karbo kaj katuno en la 19-a jarcento, kaj ambaŭ ĉefindustrioj nun kadukiĝas. — En la fin-procedoj, la purigado, kolorigado ktp. regas monopolo, kaj tie la kompanioj per "raciigo" ricevas ankoraŭ dividendojn je 20%. Proksimume unu kvadratmetro da katuno kostas 8 pencojn. El tio la krudmaterialo, la kotono, kaj ĝia purigado kostas 2 pc.; ŝpinado kaj teksado kostas 2 pc.; al la aliaj kostoj kaj la vendperantoj iras 4 pc. Sed la sola propono estas forpreni okonon de la ŝpin- kaj tekslaboristoj.

[1]) Ŝpinilo.

* * *

Josefino Ŭilson, dudekdujara servistino en Londona restoracio, mortis. Ŝi sin mortigis. Kompatindulino! Ŝi laboris en vendcentro por luksaĵoj, juveloj, multekostaj manteloj kaj vestoj, bongustaj manĝaĵoj. Sed ŝi ricevis salajron de nur 24 ŝilingoj semajne kun maten- kaj temanĝo en la labortagoj. Lupago por unu ĉambro englutis 12½ ŝil., kaj nur 11 ŝil. restis por nutraĵoj kaj vestoj ktp. Kiam ŝi plue perdis sian fianĉon, ŝi decidis fini la senesperan barakton. Laŭ famo, la estroj de la firmo, por kiu ŝi laboris (Woolworth's), estas milionuloj. Espereble ili fieras pri la fino de malfeliĉa Josefino.

* * *

Vizitantoj de la plej granda kaj riĉa urbo en la mondo, Londono, eble rimarkas la homojn, kiuj surŝultre portas afiŝojn sur pezaj tabuloj. Ili ricevas la salajraĉon de 2½ ŝilingoj tage. Protestkunvenoj okazas pri la afero.

* * *

Ŝajnas laŭ la londonaj ĵurnaloj, ke ombroj malheligas eĉ Eldoradon, t. e. Usono. 5 junaj virinoj preparis horloĝojn. Ili per brosoj metis radiumon sur la vizaĝon de la horloĝo, por ke oni povu uzi ĝin dumnokte. Konsilite ili malsekigis la brosojn inter la lipoj kaj tial nun veneniĝis. La kompanio batalis kontraŭ pago, de kompenso, sed fine devis cedi. Restas en la vivo de la kompatindulinoj nur unu jaro.

* * *

En 1914 la britaj kapitalistoj estis pruntedonintaj al aliaj landoj £ 4000 milionojn. La brita kapitalistaro superis ĉiujn aliajn, ĉar la germana nur pruntedonis £ 1500, la franca £ 1600, kaj la usona nur £ 600 milionojn. Ŝanĝo okazis. Nun la usona kapitalistaro inter 1920 kaj 1927 venkis sian konkuranton per pruntedono de £ 1300 milionoj kompare kun £ 820 de la brita. Ĉu mirinde, ke la usona registaro, kvankam parolante pri paco, pligrandigas sian armeon landan kaj maran kaj instruas ŝovinismon en la lernejoj? (488)



## EL LA SEKTORO 33
### terregiono nomata Argentino

Jam de kelkaj tagoj strikas la havenlaboristoj en Rosario. Tiu havenurbo okupas, laŭ la graveco de la eksportado de grenoj eksterlanden, la duan lokon en Sud-Ameriko. Do en tiu laboro de greneksportado okupiĝas kelkaj miloj da laboristoj (kvin ĝis ses mil). Ankaŭ kelkaj laboristinoj tie laboras pri riparado de eluzitaj aŭ disŝiritaj sakoj, en kiuj la greno estas alportita, per la vagonaro, el la kamparo en la havenurbon. Pro malbonaj vivkondiĉoj la laboristoj postulis plialtigon de la salajro. La neniam satigeblaj dikventruloj, nunaj mastroj, malakceptis. La laboristoj, ĉar la tempo estas favora, tial ke dum ĉi tiu sezono de la jaro la laboro estas tre vigla en la haveno, deklaris la strikon por nedifinita daŭro, sed certe tiom longe, ĝis la mastroj sin klinos por akcepto de la prezentitaj al ili kondiĉoj, kiuj devigos ilin elĵeti iom da tio, kion ili forglutas ĉiutage el la laborista sangelverŝo. La ĉion-glutemuloj tre furiozas kaj penas anstataŭigi la strikantojn. Sed ne facile estas anstataŭi ilin. Ne ĉiu kapablas por tiu peza kaj peniga laboro. La striko daŭras. Estas neeble anstataŭigi la strikantojn per kapabla personaro, skribas la burĝa ĵurnalo. La laboro en la haveno estas sensignifa; ĝi eĉ ne sufiĉas por la plej necesaj kaj la plej urĝaj bezonoj, malgraŭ ke la polico garantias la liberecon de laboro. Eĉ oni devis haltigi la laboron, pro nekompetenteco kaj nekapableco de la okaza personaro. Malfeliĉe jam falis, la 8-an de majo, la unua viktimo de ĉi tiu lukto, juna laboristino Luiso Lallana, 23-jara, mortigita per revolvero de strikrompanto. Tiu lasta pafis al grupo da gelaboristoj, kiuj, laŭ li, klopodis malhelpi lin kaj liajn kunulojn eniri la laborejon. Pro ĉi tiu fimortigo kvazaŭ la tuta vivo en la urbo ĉesis, ĉar multaj laboristaj organizoj deklaris tujan dudekkvar-horan strikon, por protesti kaj tiel esprimi la profundan kondolencon pro la perdo de tiu kuraĝa kunbatalantino kaj inde akompani ŝin ĝis la lasta restadejo.

* * *

La 9-a de majo estis la tago de l'entombigo de la malfeliĉa laboristino. La proletoj volis pruvi al la "ĉiopova" dio "Kapitalo" kaj al liaj servutuloj, ke ili scias respekti kaj respektigi siajn karegajn viktimojn. Jam frumatene kompaktaj grupoj de laboristoj el propra iniciato trairadis la urbon por certiĝi, ĉu ĉio estas en ordo, por malhelpi la laboron al tiuj kiuj kuraĝus malrespekti la funebran tagon. Tramoj kaj omnibusoj estis elirintaj kiel ordinare, ĉar iliaj mastroj ne antaŭvidis la okazontaĵojn. La laboristoj atakis per pluvega ŝtonĵetado la tramojn kaj omnibusojn en diversaj partoj de la urbo, dispecigante la vitrojn kaj tre difektante ilin. Tridek omnibusoj restis kun vitroj tute rompitaj kaj grave difektitaj, ankaŭ diversaj tramoj. La omnibusoj tute ĉesis cirkuladi. Nur kelkaj tramoj daŭrigis la veturon, sed gvidataj de armita policgardisto el tiel nomata "Eskadrono de Sekureco". Sed je la dudeka horo tute ĉesis la cirkulado. Eĉ la lernejoj estis devigataj fermi la pordojn kaj interrompi la lecionojn dum ĉi tiu tago. La komercistoj, maljunaj vulpoj, pro timo je malkonvenaĵoj por siaj interesoj, estis tute singardemaj nur duonmalferminte la pordojn de siaj butikoj. Kelkaj fabrikoj, kies mastroj kredis povi daŭrigi la laboron, estis devigataj tuj ĉesigi ĝin.

La entombigo de la mortigitino estis imponega manifestacio de laborista funebro. Multaj miloj da gelaboristoj kolektiĝis ĉirkaŭ la ĉerko de la juna viktimo, la virinoj kun florbukedoj.

Je la 16-a horo en la sama tago, alvenis la havenon la armea vaporŝipo "Cordoba" (elp. Kordova) por "garantii la liberecon de laboro en la haveno". Alia armea vaporŝipo atendas ordonon por alveni, ĝi estas la "Sendependeco". La komandanto de la infanteria regimento 11, kiu loĝas en la urbo, ricevis ordonojn esti preta por iu ajn eventualaĵo. La lupoj timas la bravajn kaj batalemajn havenlaboristojn. Do ĉion pretigas la kanajlaro por defendi la rabakirojn. La havenzono estas tute blokita. Malmultaj strikrompantoj (oni diras sepcent ĝis okcent, ne pli) alvenigitaj el aliaj urboj, precipe el Buenos-Aires kaj Bahia Blanca (elp. Baia Blanka), anoj de la tiel nomata "Asocio de libera laboro", fondita de mastraro, laboras en la haveno. Ili ne forlasas la havenzonon: tie ili ankaŭ manĝaĉas kaj kuŝiĝas dumnokte. La striko de la havenlaboristoj persistas kun la dekomenca entuziasmo, kaj oni antaŭvidas baldaŭan venkon.

Ivan Miliĉiĉ Ivotov (1933).

**SAT-anoj ne pruntedonu vian Jarlibron al kiu ajn. Ĉiam postulu, ke servopetanto montru sian membro-karton. Gardu vin kontraŭ profitemuloj kaj parazitoj!**

# EL AMERIKO

### Usono

La striko de la ministoj en Kolorado finiĝis, sed ne finiĝis la suferoj de la batalintoj. La entreprenistoj nur redungis malgrandan parton el la strikantoj kaj sentigas al la ministoj, ke ilia venko nur estas duona. Se la laboristoj ĉiam starigus ĉe strikoj la postulon pri redungo de ĉiuj laboristoj kaj pri pago de la striktagoj, tiam post venka batalo la fruktoj estus pli belaj ol nun. La minista subten- kaj defendokomitato en Kolorado elspezis la lastajn cendojn. Miloj da ministaj familioj estis devigataj ekzisti per semajna porcio el kelkaj funtoj da faboj aŭ terpomoj kaj malgrandegaj kvantoj da graso kaj faruno. Krom tio estas multaj okazoj da malsanoj, kaj la kuracistoj rifuzas helpon, se oni ne tuj pagas ilin. La domposedantoj postulas la lupagon, kies paglimoj jam estas transpaŝitaj, tiel ke baldaŭ okazos elpelo de centoj el la loĝejoj. Tri ministoj troviĝas ankoraŭ en malliberejo sen formulita akuzo. 22 akuzitaj ministoj estos juĝataj dum la venontaj monatoj, kaj mankas la monrimedoj por havigi advokatojn al ili.

Ĵus kiam estis finita la striko en Kolorado, ekbatalis la karbministoj en Pensilvanio, Ohajo kaj Okcidenta Virĝinio. Ankaŭ tie la entreprenistoj volas malaltigi la vivnivelon de la laboristoj, ne leĝigi la organizojn kaj ĝenerale senrajtigi la Laboristaron. La minejposedantoj aplikas la plej brutajn rimedojn. Miloj da armitaj detektivoj kaj soldatoj estas direktataj kontraŭ la laboristoj. Strikantoj estas malbontraktataj, ĵetataj el siaj loĝejoj, arestataj. En Suda Ilinojso la minposedantoj cedis kaj faris novan kontrakton kun la laboristoj, kaj ĉirkaŭ 2000 laboristoj eklaboris. Sed en aliaj partoj de la strikregiono ankoraŭ batalas ĉ. 150 000 ministoj.

### Brazilio

Post akcepto de la eksternorma leĝo kontraŭ la organizita Laboristaro ĉiuj laboristaj rajtoj estas nuligitaj. Ĉiu agitado estas malpermesita, kaj la sindikatoj kaj agemaj K-doj elliveritaj al la polica arbitro. La suspektatoj estas arestataj aŭ deportataj. En la malliberejo de Santos troviĝas multnombraj proletaj batalantoj. La organizoj kaj la helpkomitato por la arestitoj solaj ne estas sufiĉe fortaj por efike kontraŭi la reakcion. La braziliaj laborist-organizoj tial esperas helpon de la eŭropaj fratoj. Ili proponas bojkoton de braziliaj produktoj.

### Ĉilio

La polico eltrovis loĝejon, kie kaŝe estis presata anarkista gazeto. La ĉeestantaj K-doj estis transportataj al la ĝendarmejo kaj turmentataj. La presilo estis konfiskata. La polico ankaŭ enpenetris la sidejon de la Lab. Federacio Regiona Ĉilia, havigis al si membrolistojn kaj laŭ ili arestis K-dojn. Al la arestitoj oni aljuĝas komploton kontraŭ la militista diktatoreco, por ebligi proceson. Gazet-, kunven- kaj koaliciliberecoj estas nuligitaj en Ĉilio. La personoj juĝataj kiel "danĝeraj por la ŝtato" estas ekzilataj al la insuloj Paskuas kaj Mas-Afuera en la Pacifika Oceano. Multaj politikaj rifuĝantoj troviĝas en Argentino, de kie estas direktata buŝa kaj skriba propagando kontraŭ la Ĉilia diktatoreco.

Laŭ esp. gazetservo de ILA (Berlina Internacio).



# EL PORTUGALIO

La reakcio pli kaj pli fortiĝas. La registaro disvastigas la famon, ke ĉiuj deportitoj kaj politikaj kontraŭuloj ricevos la permeson de reveno. Sed estas nur politika manovro. Same antaŭ kelkaj monatoj la registaro deklaris, ke ĝi malkonfiskos la ejojn de la laboristaj organizoj fermitajn antaŭe de la polico. Fakte ankoraŭ la organizoj estas dekrete malpermesitaj kaj la ejoj fermitaj. K-do Silva Campos, la ĉefredaktoro de la nun konfiskita ĉiutaga sindikalista ĵurnalo "A Batalha", J. de Souza k. a. K-doj estis deportataj al Timor. Dum la transporto ili venis al Porto, kie la malliberuloj tri tagojn estis lasataj sen nutraĵo. La "vartisto" ricevis la komision doni al ili nur salitajn fiŝojn, sed ne akvon. Tiaj inkviziciaj rimedoj estas uzataj flanke de la militarista diktatoreco kontraŭ ĝiaj kontraŭuloj.

Laŭ esp. gazetservo de ILA (Berlina Internacio).

**Fundamenta Krestomatio**

**Ekzercoj, fabeloj kaj legendoj, rakontoj, el la vivo kaj sciencoj, artikoloj pri esperanto, poezioj**

Unu volumo in-16, 460-paĝa (10-a eld.)

**Prezo: 2.50 mk. g.**

La *libro de ĉiuj* oni povus nomi la Fundamentan Krestomation. Post *Fundamento de Esperanto* ĝi estas la verko la plej grava, kiun ĉiu esperantisto devas koni. D-ro Zamenhof tiris mem el siaj verkoj, kaj el la verkoj de la plej bonaj esperantistaj verkistoj, ĉiujn artikolojn, kiuj estas en ĝi. La libro entenas ĉarmoplenajn legendojn, interesajn rakontojn, anekdotojn, lingvajn kaj sciencajn artikolojn, ktp. Fine belegan kolekton da 70 poezioj, el niaj plej lertaj esperantistaj poetoj. Ĉio estas zorge gradigita, kio faciligas ĝian akiron al la novaj esperantistoj.

**Havebla ĉe Administracio de SAT.**

# PARIZO KAJ LA PARIZANOJ

II

"Kiom trankvila li estas!" diris mirigite infano al sia kamaradeto pri mi, kiam ni sidis kune en herbejo dum ekskurseto. Mi pensis, kiom tiu knabo estus mirinta, se li estus renkontinta je mia loko loĝanton el Sovetio. Verŝajne li ne estus trovinta vorton por esprimi tiun gradon de "trankvileco" . . . Efektive la pariza loĝantaro posedas tiun temperamenton, kiun oni kutimas nomi sangvina[1]). La meznorma parizano estas facile ekscitebla, vigla, vivega, moviĝema, korpe elasta kaj gracia, anime — facilanima, facile impresema, serena kaj gajema. La anima ekvilibra subtono estas sereneco, kiu ofte kreskas ĝis petolema, ŝercema gajeco. La intelektaj ecoj de l' parizano tre forte bridas kaj kulturas tiun gajecon, kaj en la sfero de l' racio ni trovas tiun gajecon transformiĝantan en la emon maliceti, moketi, mistifiki. Verŝajne estas la skeptikemo en lia karaktero, kiu speciale surstampas al li tiujn ecojn, kiujn oni renkontas en ĉiuj nuancoj kaj intermiksiĝoj. La skeptikemo sendube okupis la parizanon kun la progresanta kulturigo de la racio kaj de l' raciismo. Mi ofte pensis, kiaj kondiĉoj povus esti kaŭzintaj la evoluon de tiu ekstrema raciismo en la francia loĝantaro, kiun ni tute maltrovas sur la alia flanko de l' Rejnrivero, kie la sentoj ludas tute alian rolon kombine kun la racio. Bedaŭrinde estas senutila mia serĉado pri la origino de tiuj ecoj, ĉar mankas al mi la necesaj dokumentoj etnografiaj, biologiaj, historiaj. Oni povus diri, ke la romana kulturperiodo pli forte postefikis en Gallio (nuna Francio). Sed tio ne povus esti la sola kaj decida motivo. Eble la cito de faktoj viditaj kaj observitaj de mi permesos kelkajn konkludojn kaj eĉ antaŭvidojn. Mi provos komenti ilin laŭ miaj impresoj. Mi apogas min precipe sur la infana medio, ĉar la infanoj montras sin plej senafektaj kaj malkaŝaj, kaj mi povos facile kompari ilin kun samaĝuloj alilande, kies kutimojn kaj vivformojn mi bone konas.

En iu parko mi vidis ludantaron da infanoj sub la gardado de instruisto. Estis tempo por kolektiĝi, kaj la instruisto signalfajfas. Tiam mi konstatis, ke nur tre hezite kaj malrapideme la infanoj obeis kaj arigis sin. Duonŝerce ili spitis la instruiston. Mi konstatis, ke aŭtoritato preskaŭ ne ekzistis. Aŭdinte, ke en unu pariza lernklaso estas instruataj ĝis 60 lernantoj[1]), mi ne plu miris pri tio. En tiu okazo nek la infano nek la instruisto kulpas, sed la ŝtato. Por resti ĉe tiu fakto, mi diru, ke la disciplino ne nur suferas pro la pli pasia temperamento de l' parizano kompare kun la loĝantaro de pli nordaj kaj orientaj regionoj, sed ankaŭ pro la pli granda manko da kolektivsento kaj ariĝemo. La parizano estas individuema, kaj tial mankas al li organizemo kaj organizkapablo. Tio ludas tre gravan rolon en la laborista movado. El la historio ni scias, kiom la pariza Laboristaro kapablas plenumi da heroaj, sinoferaj agoj dum ribelo kaj revolucio. Sed ni ankaŭ konstatas, ke mankas la malvarma revolucia disciplino, sur kiu sole povas bazi forta laborista organizo.

Dum proletaj manifestacioj mi observis la malbonan envican iradon de la partoprenantoj. Mi rimarkis, kiom malfacile estas, malgraŭ ĉiamaj admonoj, marŝigi discipline en vicoj la zorgat-infanojn de l' proleta kooperativo aŭ la junpionirojn. Tio estas tre kontrasta al Germanio. Ankaŭ en kinoprezentadoj mi observis tiun maldisciplinecon, ke oni fumis malgraŭ kelkfoja malpermeso. En Germanio ja tute ne estus eble fumi en kino, ĉar la polico tuj enmiksiĝus . . .

Ĝenerale estas stranga afero rilate al la "malpermesoj". Se en Germanio oni trovas tabulon kun la surskribo "Vojo malpermesita" aŭ "Eniro malpermesita", oni scias, ke la malatento sekvigus severan monpunon aŭ aliajn malagrablaĵojn. En Parizo tiuj afiŝoj, ĉu de polica direkcio ĉu de iu publika institucio, absolute ne trovas ian atenton. Ŝajne ili nur estas pendigitaj pro iu ŝerca ideo. Fakte neniu zorgas pri ili. Kaj tiel oni trovas, ke la homoj, irante al subtera stacidomo, eniras prefere tie, kie troviĝas la vorto "Sortie" (Elirejo) kaj eliras tie, kie troviĝas la vorto "Entrée" (Enirejo). En stacidomo la homoj plezure trairis koridoron, sur kiu troviĝis la indiko: "Passage interdit" (Trairo malpermesita)!

Sendube tio estas tre karakteriza por la facilanimeco de l' popolo kaj . . . por la malsevereco de l' aŭtoritata burokratio (kiun lastan econ oni sentas tre agrable, venante el aliaj kondiĉoj).

Nubo.

[1]) En la moroj tio trovas sian esprimon. Ekz. oni interkisas sin publike sur la strato, tute senĝene!

[1]) Tio povus veki la imagon, ke ekzistas treege multaj infanoj en Parizo. Sed la kontraŭo estas vera. La plej multaj familioj ne havas pli ol unu aŭ du infanojn, multaj geedzoj estas seninfanaj (tion lastan mi rimarkis speciale ĉe la esperantistaj geedzoj).

# Faktoj — Demandoj

## Nova leĝo kontraŭlaborista en Svedio

La sveda parlamento akceptis kun malgranda plimulto kaj malgraŭ tre akra opozicio de la socialdemokratoj registaran proponon pri la deviga arbitracio (juĝdecido) en laborkonfliktoj. Unuafoje, depost longa tempo, la centraj kaj dekstraj partioj unuiĝis kontraŭ la laboristaj partioj. La nova leĝo ne koncernas la interes-konfliktojn, sed sole la malakordojn en interpretado de la kolektiv-kontraktoj, kiuj ekzistas inter laboristaj kaj mastraj sindikatoj. Ĝis tiam la laboristoj kiel la mastroj estis devigataj alvoki komercan tribunalon por solvi la ekzistantajn malkonsentojn. Sed la leĝaro ne antaŭvidis sankcion en okazo, kiam unu el la du partioj rifuzis sin klini antaŭ la tribunala juĝo. Oni tiam aplikis la strikon aŭ lokaŭton, por triumfigi sian vidpunkton. Tio nun estos neebla, kaj la malobeantoj estos punataj per altaj sankcioj. La novaĵo de la leĝo konsistas el tio, ke ne nur la sindikato estas kolektive respondeca antaŭ la leĝo, sed ankaŭ ĉiu membro individue. Specialaj "labor"-tribunaloj estos kreataj por certigi la aplikon de la leĝo.

Preskaŭ ĉiuj laboristaj sindikatoj havas hodiaŭ kolektiv-kontraktojn kun la mastraj sindikatoj, kaj la plej granda nombro da konfliktoj koncernas la malakordojn pri interpretado.

## Elektado kaj virinoj en Britio

Per parlamenta decido de 29. marto la ĝenerala voĉdonrajto en Britio etendiĝas ankaŭ al la virinoj de la aĝo de 21 jaroj. Tiu decido, kiu plene egalrajtigas en la elektado la virinojn, signifas la enregistrigon de 5 200 000 da elektantinoj. La civitaninoj havos nombran plimulton de pli ol du milionoj da voĉoj. Estas notinde, ke la konservativa plimulto de l' hodiaŭa brita parlamento decidiĝis por tiu paŝo, kiu donas la plenan voĉdonrajton al la virinoj. Oni povas antaŭvidi, ke sekve de tio la virinoj ankaŭ pli enpenetros la publikan vivon, okupante administrajn oficojn.

## Respondu, K-doj el Sovetio!

Laŭ franclingvaj gazetoj, kiuj sin apogas sur "Izvestija", oni konsumis en Sovetio dum 1923/24 — 96 000 hektolitrojn da alkoholo, en 1924/25 — 480 000 hektolitrojn, en 1926/27 — 3 600 000 hektolitrojn. Laŭ la konsumo de l' kvin unuaj monatoj en 1928 oni atingos sume ĉi-jare 4 800 000 hektolitrojn. Ne entenita en tiuj ciferoj estas la produktado de la privataj brandfarantoj, kiun oni taksas je proks. 3 000 000 hektolitrojn. En 1927 la loĝantaro elspezis por alkoholaĵoj 1200 milionojn da rubloj. Laŭ enketo farita

en du lernejoj pri 3420 gelernantoj 8-ĝis 16-jaraj 15% de l' knaboj, 14% de l' knabinoj regule ebriigas sin; kromaj 14% de la knaboj trinkas multe, ne ebriigante sin. 34% de la knaboj nur trinkas alkoholaĵojn, 66% bieron kaj vinon. 8% de la knabinoj trinkas brandon, 92% bieron kaj vinon. Nur 11% de l' infanoj ignoras la guston mem de l' brando. Al la demando: Kie vi trinkas? 40% de la gelernantoj respondis: ĉe amikoj, kaj 60%: hejme.



## La kamparana vivo en Estonio

Se oni komparas la vivon de l' kamparano kun la antaŭmilita, tiam tuj evidentiĝas diferenco. Neniam ne nur laboristoj vivis tiel mizere kiel hodiaŭ, sed ankaŭ la kamparano baraktis tiom en malvasteco. Neniam la kamparano estis tiel forte sub la influo de l' bankoj kiel nun. Ŝajnas, ke sen bankoj ne estas eble vivi. Se estas necesa iu malgranda reformo en la bieno, se temas pri aĉeto de iu maŝino plej simpla, oni bezonas bankon. Se la kamparano bezonas kemian sterkon, la banko "subtenas". Kaj ĉiujaraj reformoj estas necesegaj, ĉar la kamparano produktas por la mondmerkato. Tiu ĉi lasta estas tre postulema por la estonia kamparano. Li ne nur devas reformi sian kampon, sed ankaŭ labori 18 horojn tage. Malgraŭ tio la kampo rekompencas malbone, ĉar la kampnivelo estas malbona por konkuro sur la mondmerkato. Pro tiu kaŭzo la kamparano pli kaj pli ŝarĝiĝas per ŝuldoj. Aliflanke li estas troŝarĝita per la impostoj.

Interese estas rimarki, kiel sanigas sin la grandburĝaro, sub kies influo estas la kamparanara plimulto, kaj en kies poŝojn migras la laborgajno de l' kamparano. Tiuj ĉi sumoj estas eventuale tiel grandaj, ke la burĝaro mem devas serĉi vojon, kiel ŝovi en poŝojn la sumojn. Trafa ekzemplo estas dekmiloj da kronoj restantaj en kontrolkomisiono por eksporto de butero kaj porkaĵo (eksportata precipe Anglion). Antaŭe je la kamparana mizero estis kulpaj nur la urblaboristoj, kiuj estas "mallaboremaj" laborantaj ok horojn tage; sed nun ankaŭ la ŝtata geoficistaro kaj geinstruistaro kulpas, kiuj laŭ la aserto de la burĝaro ricevas gigantan salajron, kvankam ilia salajro fakte estas mizera kompare kun la vivkosto kaj alilandaj koncernaj salajroj. Kaj la naiva kamparano kredas tion, ĉar la klarigo estas malpermesata, kvankam laŭ la leĝo ekzistas parollibero.

10 438.



## TAGO EL MIA VIVO

Je la 6.30-a horo matene, en malvarmo kaj mallumo de vintro, mi eklumigis kandelon, malsupreniris ŝtuparon kaj metis akvon por teo kaj lardo sur gaskuirilo por mia matenmanĝo. Ankaŭ mi fajron ekflamigis. Kelkajn tagojn mi malsanetis, kaj tial mi estis tentata sidiĝi apud fajro. La malvarmo tremigis min, kaj la fajro plaĉis al mi. Tamen mi devos laboradi, aŭ mankos salajro en semajnfino. Kaj ĉar mia salajro jam estas malalta, mi ne povas ŝpari sufiĉe da mono por okazoj de malsano. Tiel mi foriris en malvarmega vento kaj fine alvenis ĉe la laborejo kaj forveturis kun aliaj laboristaj K-doj je 7.30-a horo al nova konstruota malsanejo. Ĉar la konstruo estis sentegmenta, mi kaj miaj K-doj devis laboradi neŝirmate kontraŭ la vetero. Kruela vento ŝajnis kvazaŭ tratranĉi min. Ĉiu minuto aperis al mi kiel horo, kaj ĉiu horo eterneco. Sed mi ne povis sidiĝi aŭ ripozi, mi devis laboradi. La ekpenso pri salajrmanko je la pagtago (semajnfine) ekagis kiel instigilo. Feliĉe je tagmezo mi trinkis varmegan teon, sed ne povis manĝi mian malvarman viandbulkon. Je la 13-a rekomenciĝis mia mizero, kaj en la daŭro de la posttagmezo mi devis supreniri altan ŝtupetaron. Suprenirinte ioman distancon, mi estis sensentigita pro malvarmego. Kaj kapturniĝante mi ekfalis. Vane mi penis reteni min ĉe la ŝtupetaro. Teren surfalante mi ekpensis: ĉu mi malkapabliĝos aŭ ĉu mi ankoraŭ povos laboradi por tiuj hejme, miaj edzino kaj geinfanoj? Bonhazarde mi nur skuiĝis. Kaj post mallonga ripozo (por ne perdi tro da labortempo) mi rekomencis la laboradon. Ĝis 17.30-a horo, plimalbonigita per la falo, mia turmento daŭris. Mia kapo doloris. Ĉiu korpmovo estis turmentego. Miaj piedoj estis kvazaŭ plumbo, kaj miaj okuloj brulis. Kiom mi ĝojis, kiam mi reveninte hejmen post varmega trinkaĵo tuj povis enlitiĝi! Kaj mi ĝojis, ke la salajro restos seninterrompa, kaj al edzino kaj infanoj nenio mankos je la pagtago. Mi trankvile ekdormis.

Tia estas mia laborista vivo en kapitalista Britio. Mi laboras kiel lignaĵisto en domkonstruado. Mia labortago daŭras 9 horojn kaj 4½ horojn sabate. Mi ricevas salajron de 60 ŝilingoj semajne. Mi pagas kiel domluprezon 15 ŝilingojn semajne.

William Cowan (10 085).

## La sklaveco de la virino

Depost kiam la homaro ekzistas, la virino estas la sklavino de l' viro. Estas nature pensi, ke niaj prauloj kondutis kiel rabobestoj, en la tempo, kiam ili estis armitaj per dentegoj, ungegoj kaj kovritaj per haroj, por diri, kiam ili estis ankoraŭ trionsimioj. La virinoj por ili estis nur rabaĵoj, por kiuj ili interbatalis per silikoj. Ĉe la plimulto de la hodiaŭaj primitivuloj la virino estas konsiderata kiel ŝarĝobesto. Ŝia sorto ne diferencas ĉe ni. La praviro perforte prenis sian kunulinon. Ni kaptas la nian per ruzo, kiu konsistas el tio, lasi ignori ĉion pri la edziĝo kaj edzeca vivo. La praulo konsideris sian kunulinon kiel objekton, ni ŝin rigardas kiel posedaĵon. Li decidis pri ŝia vivo aŭ morto, ni same. Estas ĉiam la reĝimo de la perforto jam aplikita de niaj prauloj — simiaj homoj.

Kaj tamen, niaj ungegoj kaj makzeloj malgrandiĝis, kaj nia kranio, larĝiĝis. Ĉar ni volas pensi kaj rezoni, estus necese akordigi niajn agojn kun nia racio kaj forlasi niajn kutimojn, kiuj devenas de la tempo, kiam ni posedis dentegojn kaj ungegojn. Nia tuta socia kaj seksa vivo estas bazita sur la tradicioj de la rabobestoj. Tio devas ĉesi! Bonanimuloj pensas, ke estas laŭrajte konservi la virinon en malsupera kondiĉo, ĉar ŝi estas la pli malforta. Tio ankaŭ montras la logikon de l' rabuloj. Se hodiaŭ la virino estas iom pli delikata ol la viro, tio eble nur estas la rezulto de la laboro: li militis, ĉasis ktp., dum ŝi restis hejme, por servi la viron kaj naski infanojn.

Cetere, la forto aktuale ne plu sidas en la muskola potenco, sed en la cerbo. Laŭ la kodo oni tuj ekkonas, ke la viroj kreis la leĝaron. La leĝa povo de la edzo estas preskaŭ senlima kaj tiu de la edzino kvazaŭ nula. Por ke la amo povu naskiĝi kaj daŭri inter tiu mastro kaj sklavino, estas bezonaj esceptaj cirkonstancoj. Plej ofte ne estas amo, estas nur momentaj deziroj por interŝanĝo, aŭ eĉ pli grave: perforto unuflanke, rezigno aliflanke. — Por eviti tian staton de premado, la virino pli kaj pli serĉas forigi la protekt-helpadon de la viro kaj deziras vivi per sia propra laboro. Sed ankaŭ tie ŝi trovas la arogantulon, kiu por malaltaj salajroj laborigas ŝin. Por ne morti, multe da ili serĉas rifuĝon en la prostituado. Sed oni konas la konsekvencojn de tia vivaĉo. Ĉiam, kiam la virino intencas emancipiĝi, la viro kiel eble plej multe faras por kontraŭstari. La viro malestimas la virinon. Se li ŝajnas ĝentila al ŝi, estas nur por maski la sklavajn kondiĉojn, en kiuj li akre konservas ŝin. Sub la bela ŝajno ĉiam kaŝiĝas la kruela kaj kruda viro.

Tiu malŝato speguliĝas en la lingvo mem: parolante pri la homo, oni neniam mencias la virinojn. Religie, la afero estas ankoraŭ pli fantazia: La biblio diras, ke la virino ne havas animon. En

# TRA ESPERANTIO

## El la Redaktejo

Revigliĝis la alfluo de manuskriptoj, pli frue ankoraŭ ol atingis la Legantaron nia redakteja atentigo en n-o 193. Al la malrapidiĝo, la preskaŭa halto de l' fluo sekvis denova impona alĵetiĝo de materialo. Malpli impona bedaŭrinde estas la plimultiĝo de la abonantoj, kiel avizas al ni la statistiko de la administranto. Ĝi ja montras al ni kiel al kuracisto la termometro la sanstaton de nia organo. Ĉu ni havas motivojn fari riproĉojn al ni pro malbontrakto al la Legantaro? Ĉu nia organo ne sufiĉe bone estas nutrata? Ĉu ĝia vizaĝo ne estas beligata per ilustraĵoj kaj ĝia tuta korpo flegata per bone komprenebla lingvaĵo kaj stilo?

Nur 5 semajnoj disigas nin de la jubilea numero, la 200-a. Ĉu tiu jubileo estos tago de pura ĝojo? Ĉu ni kun fiero povos diri, ke ni atingis la celon, kiun ni starigis al ni? Zorgu vi, legantoj, kiuj ŝatas vian gazeton, ke ĝia sfero de disvastiĝo larĝiĝu de tago al tago, ke ĝia abonantaro plinombriĝu, ĉar kun ĉiu nova abonanto kreskas ĝia influo kaj ĝia agokapablo. Zorgu vi, ke post 5 semajnoj ne miksiĝu acidaj gutoj en la pokalo de dolĉa ĝojo...

* * *

Ĉiam ankoraŭ kelkaj K-doj erarkomprenas la signifon kaj la karakteron de nia ĵurnalo. "S-ulo" ne povas anstataŭi ĉiutagan gazetaron! Ĝi ne apogas sin kiel ĉi tiuj sur la depeŝagentejoj; ĝi ne volas ripeti esperantlingve, kion same diras ĉiulingva gazetaro al la novaĵ-avidaj legantoj. Ĝi havas sian propran kvaliton, ĝian specialan karakteron, utiligante raportojn ricevitajn senpere dank' al esperanto el ĉiuj landoj kaj terzonoj pri situacio, kondiĉoj kaj movado de la Laboristaro tutmonda. Fidinda, klarvida, faktojn objektive konsideranta raportantaro estas nia bazo kaj nia forto.

N. B.

---

## TUTMONDA STATISTIKO

Legantoj de "S-ulo" eble memoras, ke ni publikigis antaŭ 20 monatoj (n-o 108, okt. 1926) alvokon de s-ro Dietterle pri tutmonda Statistiko. Kiel promesite, la statistikulo sendis al ni sian raporton, el kiu ni publikigas jenan resumon:

En proksimume 90 landoj, en pli ol 7000 lokoj de la mondo ekzistas sume **126 508** esp-istoj, pri kiuj ni havas fidindan scion. El ili 41 751 estas organizitaj en 1776 grupoj (inter ili 632 fakaj grupoj), el kiuj 693 posedas esp. bibliotekon. En la grupoj oni okazigis dum 1926 2531 kursojn, k sume laŭ la raportoj 12 014 kursojn. Krom tio ekzistas 16 920 izole vivantaj esp-istoj en lokoj, kie ne estas aŭ ne respondis grupo k 67 837 ekstergrupaj esp-istoj en lokoj, kie estas grupoj.

Pri tiu statistika bildo de la esp-a movado ni devas rimarkigi:

1. Ke estas malfacile difini la esp-istecon de la statistikitoj. Ĉiu ja bone scias, ke en multaj grupoj estas anoj, kiuj nur pagas kotizon k apenaŭ povas balbuti: "Bonan tagon! kara samideano...", aŭ similan banalan frazon. Ĉu tiaj grupanoj vere estas esp-istoj? Kaj ĉu oni ankaŭ povas alte taksi la esp-istecon de la 67 837 ekstergrupaj personoj?

2. Multaj esp-istoj apartenas al du, tri, kvar, eĉ kvin grupoj; aliaj estas anoj de ĉiuj internaciaj asocioj. Ĉu oni atentis pri tio en la statistiko?

Pli ĝustan k fidindan — sed malpli imponan — bildon pri la vivanteco de la esp-a movado liverus statistiko pri la nombro de abonantoj al esp-lingvaj gazetoj, pri la nombro de esp-lingvaj libroj aĉetitaj — k legitaj...

Ni ne kreu al ni iluziojn: la esp-a movado estas ankoraŭ tre malforta. Kaj ĝi restos tia, tiom longe, kiom granda plimulto da esp-istoj traktas sian aferon neserioze, diletante kvazaŭ ludaĵon aŭ akcesoraĵon...

Decas tamen mencii, ke s-ro Dietterle k lia helpantino-sekretariino, f-ino E. Wunderlich, plenumis laŭdinde tre grandan k pezan taskon.

E. L.

---

### Por lumbildaro

Antaŭ kelka tempo mi alvokis pristudi proponon pri kreo de lumbildserio laŭ la Malgranda Terbiblio de SAT. Oni povus plibonigi la aferon, se la K-doj kolektus rasajn bildojn k sendus al la Estraro de SAT. Ekz. per fotoj pri antikvaj egiptaj aŭ grekaj skribaĵoj estus eble pruvi, ke ĉiu lingvo estas artefarita. Tiel oni povus krei belegan lumbildaron, kaj la Malgranda Terbiblio povus esti la tekstlibro por la klarigoj. (8384)

---

### Elektoj en la Akademion

Okazis lastatempe nova balotado por elekti Akademianojn. Estas elektitaj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| S-roj | Grosjean-Maupin . . . | 85 | voĉoj |
| „ | Cart . . . . . . . | 82 | „ |
| „ | Corret . . . . . . | 67 | „ |
| „ | Collinson . . . . . | 65 | „ |
| „ | de Lengyel . . . . . | 63 | „ |
| „ | Belmont . . . . . . | 46 | „ |

---

### Al ĉiuj Soveti-anoj!

Monon por la Adm. de SAT, ne sendu al Leipzig, sed al nia bankkonto ĉe C. K. de SEU en Moskvo. Niaj bankoj ne akceptas sovetian monon. — *Adm.*

---

la ĉefaj katedraloj ŝi ne rajtas sidi en la mezo, nur ĉe la flankoj. Depost la socia origino la viro ĉion faris por malebligi ŝian instruiĝon. Ĉar sklavo, kiu instruiĝas, fariĝas malbona sklavo! La edukado de la junulino estas edukado de servistino. Oni lasas ŝin inter la kaseroloj kaj kudraĵoj. Oni malspritigas ŝian cerbon per stulte naivaj legaĵoj. Oni malnobligas ŝian karakteron per obeema kutimo. Oni kredigas al ŝi, ke estas honto ami lojale junulon kaj fariĝi patrino aliel ol per la homa leĝo. Sed oni diras al ŝi, ke estas tute nature, edziniĝi kun maljunulo, kondiĉe ke li estu moŝta sinjoro. La kristanismo pensas pri ŝi, ke ŝi estas malpurulino. Tial ŝi estas rifuĝejo por ĉiuj antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj. Ŝi konservis sklavajn kutimojn kaj gustojn: por nova robo aŭ iu ajn donaco ŝi afabliĝas. Kiel la sovaĝuloj ŝi portas senutilajn ornamaĵojn, ringojn kaj juvelojn. Ŝi ornamas sin per kolĉenetoj, braceletoj, amuletoj, portas plumojn sur la kapo, kiel la sovaĝuloj kaj niaj generaloj. Ŝi traboras la orelojn, por alkroĉi objektojn. Jam estas venko, ke ŝi perdis la kutimon meti ringon tra la nazo aŭ la lipoj! Ŝi portas ŝuojn, kiuj ne taŭgas por marŝi. Sed la vanteco estas pli forta ol la inteligenteco.

Tio devas ĉesi. Ŝi devas scii, ke ŝi ne estas ludilo, nek servistino nek aĉeteblaĵo. La libera virino estas revolucio en la mondo, kies konsekvencoj estas netakseblaj. Estas la fino de la religio, ĉar ŝi tenas per tio la viron kaj la infanojn. Estas la fino de la militoj, kiuj mortigas la edzon, amanton kaj infanojn. Estas la fino de la prostituo kaj diboĉado, la fino de la perforto kaj alveno de la bonfaremo. Tiam la virino estos nia bona kunulino en bonaj kaj malfavoraj tagoj.

Nova epoko de la homaro leviĝas kun la libera virino.

Marceau (7767)
Parizo.


**SENNACIECA REVUO**

**La junia kajero aperis!**

**LITERATURA SERIO**

ENHAVO:

*S. P. Filippova:* En malliberejo. Vers. — *Dimitrij K.:* Letero el la malliberejo. Trad. el bulg. Stebek. — *5241:* Larmojn forgesu, patrin'! Vers. — *William Morris:* Leciono de reĝo. Trad. Materiero. *Vsevolod Ivanov:* Propagando. Fragmento el "Kirasa vagonaro n-o 14—19." Elrusigis 5221. — *Anatole France:* La virinoj pri kristanismo. Trad. E. L.

Havigu al vi tiun ĉi interesan kajeron!

Mendu senprokraste ĉe Administrejo de SAT, **R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27**

## *INTER NI*

*— Vi ofte diras, ke la SAT-anoj devas esti homoj, celantaj enkonduki racion en sia mondpercepto. Bedaŭrinde mi konas multe da K-doj, kiuj multrilate agas tute neracie. Ili manĝas viandon, trinkas alkoholaĵojn, fumadas kaj vestas sin laŭ tute netaŭga maniero. Ili malliberige difektas siajn piedojn per ŝuoj multkostaj; ili tenas sian kolon per malmola ŝtofa ringo, kiu malhelpas ilin spiradi libere; ili kovras sian kapon per ridindaj kaj karaj vestoj, kiuj nur havigas al ili kalvon . . .*

*Ĉu tio estas racia? Ĉu tio estas SAT-aninda? . . .*

*— Nu, kian praktikan konkludon vi intencas doni al via parolo? Ĉu vi intencas proponi, ke nur vegetarano, nefumanto, nudpiedulo kaj similaj raciemuloj povu aliĝi al SAT? Se jes, ni devos eksigi almenaŭ 95 pocentojn el niaj membroj . . .*

*Kaj ĉu vi estas certa, ke se ne plu troviĝus en SAT "kadavromanĝantoj", regus plena interkonsento inter la restantoj? Ĉu ne ekzistas inter vegetaranoj diversaj malkonsentoj? Ĉu la krud-manĝantoj ne riproĉas al la kuir-manĝantoj ilian . . . malraciecon? Kaj kial rekomendi nur la senŝuecon kaj senĉapelecon? Ekzistas ja sektoj el kompletaj nuduloj. Se estas racie iri nudpiede, certe la senvestuloj posedas pli altan gradon da racieco . . .*

*Ni ja devas penadi ĉiam agi racie. Sed ni ne faru el la racio dion. Ni ne imitu la francajn revoluciulojn, kiuj, en 1793, starigis kulton al la diino Racio. Ornamante racion per mistika aŭreolo, ili agis ne racie sed religiece . . .*

*Pri multaj punktoj en la politika kaj socia vivo ne ekzistas absoluta certeco. Ne estas definitive pruvite, ke manĝado de viando estas malracia. Kaj se la homoj militus iuj kontraŭ aliujn por provizi sin per viando, t. e. se la venkinto manĝus la venkiton, oni ne povus prave diri, ke la milito estas malracia . . .*

*La simpla saĝo rekomendas al ni toleremon. Se anarkistoj, komunistoj, sindikatistoj kaj socialistoj povas kunlabori en SAT, ni ankaŭ ebligu al viandomanĝantoj kaj vegetaranoj diversspecaj kunagadi por enplanti en la socia vivo la ĝeneralan uzadon de esperanto . . .* E. L.

---

**Korekto en korekto.** Eĉ en la korekto mem (n-o 194, pĝ. 307, 3-a kol. linio 4 de malsupre) enfuŝiĝis la preserardiablo, malklarigante la klarigon. Legu: "Oni povas interesigi, t. e. fari kurson interesa (ne **-an**) . . ." En la sama n-o korektu pĝ. 308, 3-a kol., linio 7 de supre: "konvinkiĝas (anst. konvinkas); pĝ. 309, 1-a kol., linio 22 de supre: religio (anst. religioj).



## RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

**Dr. Samenhofs Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch.** Eld. Rud. Mosse, Berlin, Esp-Abteilung. Kvara eldono tute nove prilaborita de Prof. P. Christaller k. Instruisto H. Böbs. 120 pĝ. Forta bindaĵo (kalikota). Poŝformato. Prezo nemontrita. — Tiu vortaro estis iam redaktata de D-ro Zamenhof mem k estis multe uzata, precipe de komencantoj. Ankaŭ tiu ĉi plilarĝigita eldono celas servi precipe al komencantoj. Sed la vortaro estas tiel riĉenhava, ke ĝi utilos ankaŭ al longjaraj esp-istoj. Per signoklarigoj oni trovas, ĉu iu vorto estas oficiala aŭ de kiu aŭtoro ĝi estas uzita. La aranĝo tre klara. Ĝia praktika formato k la modesta paĝamplekso ebligas ĝin porti ĉiam k ĉie en la jako. N. B.

**Gvidfolio pri Norderney.** Eldonita de la banloka direkcio sub aŭspicioj de UEA, turisma servo. 16-paĝa plaĉe prezentita gvidlibreto kun bildoj kaj prezaro por la restado en tiu burĝa luksbanloko sur la Norda maro. Tre taŭga por propagandaj celoj.

**Graz 1928.** 800-jar-festo. Jubileaj Ekspozicioj. Jubilea Foiro. Ilustrita prospekto kun belaj ilustraĵoj de la ĉarme lokita urbo k programo pri la ekspozicioj, muzikfestoj, solenaĵoj k foiraranĝoj okazontaj de 23. junio ĝis 31. aŭgusto k de 29. sept. ĝis 31. okt. 1928.

**Supplément Commercial à L'Esperanto en dix leçons** suivi d'un Précis de Sténographie par Em. Robert, 5 rue Ravignan, Paris 18. Prezo 1.50 f. fr. (inkl. afranko). 32 pĝ. Aldono al Esp. Kurso en 10 lecionoj por komercaj aferoj k stenografio (frazoj, vortoj, komerc-leteroj ktp.).

**Libera Urbo Danzig.** Ŝtatjura pozicio k ekonomia signifo de l' Libera Urbo Danzig de D-ro H. Martin, trad. Rob. Kreuz. Eld. Danziger Verlagsges. m. b. H., Danzig. 32 pĝ. Broŝ. Form. 10×16½ cm. Havebla kontraŭ afranko de K-do Kurt Klaps, Karpfenseigen, 12, Danzig. Sur bela papero presita kun tre belaj ilustraĵoj k teksto pri la historio, la ekonomia k politika signifo de Danzig.

**Nova ŝlosilo de esp-o por svedlingvanoj.** Prezo 0.10 sved. kr. Formato k enhavo kiel ĉe la alilingvaj ŝlosiloj. Kun tiu (sepa) eldono estas presitaj sume 80 000 svedlingvaj ŝlosiloj, rimarkinda kvanto por negranda lando. La adreso de la Sveda Lab. Esp. Asocio estas entenita. La ŝlosilo estas havebla ĉe Eldona Societo Esperanto, poŝtfako 698, Stockholm 1.

**Poŝtkartoj de D-ro Zamenhof k s-ro Ĉe.** Eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, poŝtfako 698. Prezo 1.5 svis. fk. por 10 pecoj. La profito estas uzata por la propagando de s-ro Ĉe en Svedio. La du kartoj estas tre belarte presitaj.

**Sir H. Rider Haggard, Luno de Izrael.** Rakonto pri la Eliro. Trad. Edward S. Payson k Montagu C. Butler. Eld. The Esperanto Publishing Comp. Ltd., 142, High Holborn, London W. C. 1. Form 12×18 cm. 220 paĝoj. Prezoj: broŝ. 3 ŝ. 6 p. (afr. 4 p.); bind. 5 ŝ. (afr. 5 p.).

**Violets Schulhefte der Handelskorrespondenz. Esperanto.** 500 komercaj frazoj de Rob. Kreuz. Eld. W. Violet, Stuttgart. Form. 12½×18, broŝ. Prezo 1 svis. fk. — La eldonejo Violet, kiu jam kelkfoje montris sian favoron al nia lingvo, aperigis per tiu ĉi eldono praktikan libreton por komerclernantoj, por studo en kursoj k hejme. Ekzistas por kelkaj naciaj lingvoj paraleleldonoj, kiuj estas samtempe uzeblaj kun la esp. eldono. La frazoj estas ĝenerale bone verkitaj. Ni notis tamen kiel erarojn: pĝ. 29 — komenci (anst. "komenciĝi") k "mado" (germanismo) anst. akaro. N. B.

**Internacia Transportlaborista Federacio** (I. T. F., Vondelstraat 61, Amsterdamo) eldonis 5 raportojn prezentatajn per la Federacio al la XI-a kunveno de la Intern. Labor-Konferenco en Ĝenevo. La temoj estas: Projekto al intern. reguligoj k konvencioj por protekto de la havenlaboristoj; Antaŭgardo je akcidentoj k malsanoj en motor-transportoj; Limigo de la pezo de port-ŝarĝoj; La danĝeroj de la unuhomaj lokomotivoj k motorveturiloj; La antaŭgardo je akcidentoj fervojaj per la aŭtomata kuplo. La raportoj estas tre ampleksaj broŝuroj, ĉar ili ĉiuj estas presitaj kvinlingve (ne en esp-o).

---

## TRA LA MOVADO

(Kroniko)

**FRANCIO. Toulouse.** La ĉi tie dum pentekosto okazinta 25-a Nacia Kongreso Socialista voĉdonis pri rezolucio poresp-a, ke ĝi estu transsendata al la parti-estraro por pristudo de la disvastiĝo de esp-o. — **PORTUGALIO. Lisbono.** En lab. esp. societo "Nova Vojo" komenciĝis 1. 5. kurso kun 25 partoprenantoj, kiun gvidas K-do Carmo (8021) laŭ "Petro". — **SOVETIO. Groznij.** La ĉi tiea nove instalita radio-stacio raportas ankaŭ en esp-o k intencas aranĝi esp. kurson. Proks. 1. julio okazos radio-ekspozicio, por kiu ni bezonas materialon. — Radio-stacio. — **Krivoj-Rog.** De 22.—26. majo okazis ĉi tie 7. profsindikata kongreso (temas pri grava minregiona distrikto), por kiu ni ricevis kelkajn esp. leterojn de lab. esp. organizoj el eksterlando. La prezid. K-do Rajuŝkin diris: "Krom tio, ke ni priservas nian membraron, ni ankaŭ havas interligon dank' al nia esp.-kancelario kun eksterlandaj laboristoj, kion pruvas la multaj salutleteroj ricevitaj en esp-o, presitaj en la hodiaŭa n-o de 'Krasnij Gornjak'." K-do Rejtman sub tondraj aplaŭdoj laŭtlegis la leterojn nome de la loka esp. grupo. Tio okazis ĉiutage. Ankaŭ ekspozicio estis aranĝata. Por nia distrikto tiu okazo havis gravan signifon. — M. R.

---

## PRIKONGRESAJ PROPONOJ

### Propono 2

La jara kotizo de SAT estu plialtigata ĝis meze 2½ germ. markoj.

En "S-ulo" jam estas dirite, ke la nuna kotizo proksimume egalas la kostojn de la Jarlibro. Restas do preskaŭ neniom por administraj elspezoj, salajro de oficistoj ktp. Ĉi tiuj estas nun pagataj per la mono, kiu estas ricevata por la vendataj libroj, do per la kapitalo, kiu devus esti uzata por eldoni novajn librojn. Ĉi tiu stato ne povas resti. Eĉ eventuala perdo da membroj estus malpli malbona ol daŭrigo de la nuna financa malsano de nia asocio.

670, 1839, 1940, 4877 en Enschede.

---

**La "Fundamento de Esperanto"[1]) devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝo de la vojo de unueco.**

**L. L. Zamenhof.**

[1]) Mendebla ĉe nia Administrejo.

## MEMORNOTO

**Represis el "S-ulo":**

Rada (Konsiliĝo), Lvov, 30. 5., Usona lab. situac. (188.)

**Priesper. artik. k notojn enhavis:**

Daily Herald, London, 8. 6.; Der Deutsche Eisenbahner, Berlin, 3. 6. (kurso); Freie Sportwoche, Leipzig, 4. 6.

**Pri SAT-kongreso enpresis:**

La Fervojisto, Zagreb, majo.

**Peresper. leteron aperigis:**

Krasnoje Znamja, Krasnodar, 5. 5.

## NIA POŜTO

**10 504.** — Ni povus publikigi vian noton nur kiel pagitan anoncon.

**4691.** — Via manuskripto estas ricevita de ni; ni uzos ĝin okaze por "SR".

**est.** — Ni ricevis vian grandan versaĵon, sed ne scias, ĉu k kiam ni povos presigi ĝin, ĉar ni jam posedas tre multajn poemojn, k la via bezonas prilaboron.

**7151.** — Ni ne memoras pri via manuskripto. Prefere vi senpere korespondu kun K-do 7113 pri la afero. Kiel memstaran artikolon ni ne trovas sufiĉe taŭga vian Seipel-aĵon por "S-ulo". Tamen la entenataj informoj povos servi al ni en alia okazo. Red.

**1933.** — Via raporto estis bonvena. Ni ŝatos ankaŭ estonte vian kunlaboradon.

**3409.** — Se ni enmetus vian artikolon, ni estus superŝutataj per refutoj de "opoziciuloj", kiuj ne deziras presliberecon por la burĝaro, sed por si.

**227.** — Tempo absolute mankas, por ke mi povu legi vian tradukon; sendu ĝin al Lit. Komisiono (Odessa). E. L.

**5432.** — La vico de via "Tago" venos en la proksima n-o.

**7569.** — Via sciigo jam aperis delonge en la ĉiutagaj gazetoj. Komprenu, ke tiaspecaj sciigoj absolute ne taŭgas por "S-ulo".

**2821.** — Tro malfrue alvenis via "Protesto" por aperi en ĉi tiu n-o; ĝi aperos en la venonta.

### Por sin perfektigi en esperanto

ankoraŭ jenaj miaj gelernantoj **serĉas korespondantojn** el ĉ. l., L, PI, PK, pri gelaborula vivo, stato, laboro, politikaj k sociaj demandoj ktp.:

1. K-do Artemjev Leo (29-jara, lignaĵisto), USSR, Samara, Krestjanskaja 91, kv. 2.
2. K-dino Petriŝĉeva Nina (20-jara, oficistino), Samara, Torgovaja, 41, kv. 51.
3. K-dino Iskvarina Taja (20-jara, fervojistino), Samara, Nekrasovskaja 137, kv. 32.
4. K-do Mironov Viktor (21-jara, laboristo), Samara, Krasnoarmejskaja 78, kv. 2.
5. K-do Voinov Veniamin (39-jara, lab.), Samara, Uralskaja 86, kv. 2.
6. K-dino Pleŝakova Ŝura (20-jara, anino de dramrondeto), Samara, Nekrasovskaja 137, kv. 36.
7. K-dino Stabrovskaja Ŝura (19-jara, fervojistino), Samara, Krasnoarmejskaja, dom Ĉeliŝeva, III pod'ezd, II etaĵ, komnata 208.
8. K-dino Mironova Tonja (19-jara, lern.), Samara, Vilonovskaja 112.
9. K-dino Kosigina Lola (19-jara, skribmaŝinistino), Samara, Nekrasovskaja 137, kv. 11.
10. K-do Afanasjev Nikolao (23-jara, fervojisto), Samara, Vilonovskaja 110, kv. 5.
11. K-dino Anoŝkina Aleksandro (28-jara, hejmmastrumantino), Samara, Sadovaja 166, kv. 1.
12. K-dino Pimenova Tonja (19-jara, oficistino), Samara, Orenburgskaja 74, kv. 2.
13. K-dino Ĥrabrova Tamara (18-jara, lernantino), Samara, Saďovaja 206, kv. 3.
14. K-dino Nikitina (22-jara, librotenistino), Samara, Vokzal, ĥoz.-mat. otdel.

**(Daŭrigota — Vidu duan liston)**

Ili komencas progresigan kurson. **Kamaradece mi petas helpi ilin per korespondado,** por praktike perfektiĝi en esp-o. Respondo estas garantiata. Se iu okaze ne ricevus iam respondon, bonvolu vin turni al **kontrolanto: K-do Jefremov, Samara,** strato de Leo Tolstoj 102, kv. 2.

**Sennaciece B. Jeleznjakov (5583).**

### Gek-doj el ĉiuj landoj!

En aŭgusto ni intencas aranĝi propagand- k varbsemajnon kun ekspozicio. Por tio nia juna grupo ne posedas materialon. Tial ni petas ĉiujn alilandajn gek-dojn kaj esp. grupojn, sendi al ni PK, PI aŭ letersalutojn, por ke ni povu pruvi, ke esperanto ekzistas en ĉiuj landoj. Ĉiu certe ricevos respondon. Skribu al adreso: Otto Hauschild, **Zeitz** (Thür.), Leipziger Str. 34 (Germanio).



### Komuniko al la franciaj SAT-anoj

**De nun nia Asocio havas sian propran ĉekkonton poŝtan: Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris 20, compte de chéques postaux N-o 1234—22, Paris (sen ajna personnomo).**

**Por transsendi la kotizojn, abonojn, libromendojn ktp., ni konsilas al la franciaj membroj kaj perantoj uzi tiun ŝparan rimedon.**

---

**N. LENIN:**

## Ŝtato kaj Revolucio

150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g

Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT

**R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27**

**Ĉu vi multe ricevas por via semajna laboro?**

### JUNAJ LABORISTOJ

de ĉiuj landoj kaj de ĉiuj profesioj, respondu al junlaborista ĵurnalo "Juna Gvardio", USSR, **Odessa,** Puŝkinskaja 32, red. "Molodaja Gvardija", **Esper. fako.**

Nin interesas **ekonomia situacio** (buĝeto) de junaj laboristoj (aĝo ĝis 25 jaroj); ankaŭ la situacio de junlaboristoj-senlaboruloj.

Respondojn de ĉiuj ni dissendos al ĉiu partopreninto en nia enketo. — Skribu multnombre!

### JUNAJ RUĜFRONTANOJ!

**Junkomunistoj, junpioniroj!**

Kunligiĝu per konstanta frata korespondado kun komjunulaj organizoj, junpioniraj taĉmentoj de Odessaj fabrikoj kaj entreprenoj.

Skribu viajn adresojn al redakcio de junkomunista ĵurnalo "Juna Gvardio", USSR, **Odessa,** Puŝkinskaja 32, **Esper. fako.** Red. "Molodaja Gvardija". Respondo estas garantiata, ĉar en redakcio estas speciala esperantisto-kunlaboranto. Dezirinda estas ankaŭ foto-interŝanĝo kun redakcia fotorondeto.

### ILUSTRITAJ AFIŜOJ

pri proleta propagando (sindikata, koopera, helpa...), eldonitaj de ĉiulandaj organizoj, estas petataj por dekoracii nian Popoldomon. Ĉiu sendaĵo rekompencota nepre.

Groupe Espérantiste Ouvrier, 5, rue du Réservoir, **Orléans** (Loiret), Francio.

### ENHAVO:


| | pago |
|---|---|
| En Sovetio plimultiĝas la pastroj, sed ne la religianoj | 311—12 |
| Letero el Londono | 312 |
| El la sektoro 33 | 312—13 |
| El Ameriko | 313 |
| El Portugalio | 313 |
| Parizo kaj la Parizanoj | 314 |
| Faktoj — Demandoj | 314—15 |
| La kamparana vivo en Estonio | 315 |
| Tago el mia vivo | 315 |
| La sklaveco de la virino | 315—16 |
| Tra Esperantio | 316—18 |
| Anoncoj | 318 |



## Abontarifo al Sennaciulo:

(La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.)

**Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgo 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉekoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, mk. 700 (800); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.**

Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero. La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Administranto n-o 6835.
La abono validas nur post pago kaj povas komenciĝi kun ĉiu numero.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)